

DIA REGNO

ISSN 0167-9554

DIA REGNO

✧ dumonata kristana revuo en esperanto ✧ n-ro 6 (849) 2004 ✧

Kristnasko



Liturgio

Informoj • Indekso 2004

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala, kunlaboranta
kun UEA

Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj
landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri
Jesuo Kristo.

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet, FR 86340
Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0)5 49 46 80 21;
✉ diaregno@altern.com.

Sekretario: Els VAN DIJK-KUPERUS

✉ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn,
Nederlando; ☎ +31 1724 20222;
✉ j.a.van.dijk@hetnet.nl

Kasisto: Siegfried KRÜGER

✉ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074
Heilbronn, Germanio; ☎ +49 7131 162688;
✉ SLKrueger@gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume
€20,- ☎ Membro-subtenanto €30,- ☎ Nura
abono: pagante rekte al KELI €16,- ☎ pagante al
Libroservo €18,- Sendoj de okcidentaj monbiletoj
per registrita letero al la kasisto de KELI ☎ Se
estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu
ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto
kelk-p de KELI ☎ Nederlanda poŝtĝirkonto de
KELI: 5506132.

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo — ISSN 0167-9554

Redaktoro: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet, FR 86340
Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0)5 49 46 80 21;
✉ diaregno@altern.com.

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ
egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la
kasisto de KELI (vidu supre).

**Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe,
ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ
traduko oni sendu al la Redaktoro.**

**Enpaĝigo, grafika prilaboro, presado
kaj ekspedado:**

Eldonejo HEJME Kazimierz LEJA
✉ pf. 59, PL 41-250 Czeladź, Pollando
☎ +48 32 2650038; ✉ kleja@hejme.e-tools.pl

ENHAVTABELO

- 123 Kial Kristnasko—festo?
Jesuo estas la Mesio
- 124 Nova jaro: Vidi per novaj okuloj
- 125 La motivo de la boneco de Dio
- 126 Rigardante al Jesuo
Dio alparolas siajn infanojn
- 127 La reformita liturgio kiel proklamo de la
graco
- 133 Spirito de Asizo
- 134 Propono al la tutmonda samideanaro
- 135 40—procenta kresko de 'Esperanto' ĉe Google
Kampanjo "Esperanto en la bibliotekoj!"
- 136 Kajto, FAME—premiita
- 137 Indekso de la jaro 2004
- 141 Kotizoj de KELI 2005
- 144 Oni apenaŭ povas kredi...

Redaktoraj vortoj

Karaj gelegantoj,
Jen la lasta fojo, kiam mi turnas min al vi kiel
redaktoro.

Venontnumere, mi lasos al vi vortojn por la
nova jaro, kiel prezidanto, kaj la revuon zorgos
alia. Mi memoras mian unuan KELI-kongreson,
Edinburgo, 1977, kiam ni ambaŭ konatiĝis kiel
«junuloj». Tio estis antaŭ preskaŭ tridek jaroj.

La tempo pasis. Pli junaj alvenis. Ne sufiĉe
laŭ niaj impresoj. Aliaj malaperis, ŝulde de aĝo
aŭ malsano. Tio estas la vivo ankaŭ de asocio,
de ligo.

Kaj en tiu periodo, nia afero antaŭeniris, dank'
al la graco de Dio, kaj la laboro de la KELI-anoj,
ĉefe de kelkaj, inter ili nia longdaŭra prezidanto
Adolf BURKHARDT. Restas nun por fari tiun hi-
storian laboron pri ĝuste tiu periodo post «*Nia
Historio*».

Kaj la estonteco estas nun nia. Kion ni celas?
Ni bone pripensu, kaj preĝu.

En ĉi tiu lasta numero, krom pecoj sezonaj
kaj tradiciaj (indekso, kotizoj), estas mia pre-
lego dum la kongreso, pri la reformita liturgio
ĝenerale kaj pri la ekzemplo en *Adoru*. Espereb-
le mi povos daŭre kontribui en la revuo. Do ĝis
baldaŭ, kaj Dio benu vin ĉiujn.

Philippe COUSSON

KIAL KRISTNASKO—FESTO?

*Kaj ŝi naskos filon; kaj vi nomos lin JESUO; ĉar li savos sian popolon de ĝiaj pe-
koj.* (Mateo 1:21)

Kristnaska sezono estas ĉi tie! Ĝi estas
la plej populara kaj plej festa de ĉiuj sezo-
noj. Firmaoj kaj aliaj institucioj celebras la
sezonon grandmaniere. Infanoj ĉiam dezi-
ras la sezonon pro ĝia gajeco, aparte, la vi-
zito de „Santa Klaŭs” — kiu donas al ili
donaĵojn. Multaj homoj sendas salutkar-
tojn kaj donaĵojn al siaj amatoj. Tamen, kial
Kristnasko? Kial celebri ĝin?

Kristnasko memorfestas la naskon de la
Sinjoro Jesuo Kristo en staltrogo en Bet-
Leĥem proksimume du mil jarojn antaŭe.
Kio faris Jesuon kiu estas Dio simila al ni?
Kio faris Lin aperi kiel ordinara persono?
La Sankta Biblio malkaŝas almenaŭ sep kia-
lojn. Jesuo venis en la mondon por: 1. savi
homojn de iliaj pekoj (Mateo 1:21; Johano
1:29); 2. alvoki pekantojn en penton (Mateo
9:12, 13; Marko 2:17; Luko 5:32; 1 Timot-
eo 1:15); 3. savi la perditajn (Mateo 18:11;
Luko 9:55; 19:10; Johano 3:17); 4. plenumi
la leĝon (Mateo 5:17); 5. liberigi homojn
de mallumo (Johano 12:46); 6. prediki la
evangelion (Marko 1:38); kaj atesti pri la
vero (Johano 18:37); 7. fari la volon de Dio
(Johano 6:38).

De la supraj punktoj, Jesuo venis por re-
venigi nin al Dio. Ĉu vi venis al Dio? Ĉu vi
akceptis Lin kiel vian personan Savinton
kaj Sinjoron? Celebro de Kristnasko estas
sensignifa se vi ne akceptis Lin. La celo de
Kristnasko estas la eterna savo de vi kaj mi.
Lasu ĉi tiun historian sezonon plenumi tiun
celon en via vivo.

Je la servo de Dio,

pastoro Bayo AFOLARANMI

Jesuo estas la Mesio

1. Li estas la filo de la Plejalta

Dio sendis la anĝelon, Gabrielo, al Nazareto
kun mesaĝo por iu knabino, kiu nomiĝis Maria.
Ŝi fianĉiniĝis kun Jozefo, viro el la familio de Da-
vido. Gabrielo eniris ŝian domon kaj diris: *Jubi-
lu, Maria. Dio estas kun vi. Li elektis vin.* Maria
ektimis kaj demandis al si, kion tiu parolo signi-
fas. Sed Gabrielo diris: *Ne timu, Maria, ĉar Dio
favoras vin. Vi havos infanon; vi naskos filon. Kaj*



*vi nomos Lin Jesuo. Li estos granda kaj nomiĝos
filo de la Plejalta.*

*Sed kiel tio okazos — demandis Maria. — Mi
ne interrilatas kun viro. Gabrielo respondis al
ŝi: La sankta Spirito, la forto de la Plejalta, mal-
suprenvenos super vi. Al Dio nenio estas neebla.
Tiam Maria diris: Jen la servantino de Dio. Al mi
okazu kion Dio volas. (Luko 1:27–38)*

Bibliajn tekstojn tradukis

G. F. DE RUYVER F. C., Belgio

Nova jaro: Vidi per novaj okuloj

Kaj li parolis la jenan parabolon: Unu viro havis figarbon, plantitan en lia venbergardeno, kaj li venis, serĉante frukton sur ĝi, kaj ni trovis. Kaj li diris al la vinberisto: Jen tri jarojn mi venas, serĉante frukton sur ĉi tiu figarbo, kaj min ne trovas; elhaku ĝin, kial ĝi senutiligas ankaŭ la teron? Sed li responde diris: Sinjoro, lasu ĝin resti antaŭ ĉi tiun jaron, ĝis mi fosos ĉirkaŭ ĝi kaj metos sterkon; kaj se ĝi poste donos frukton, bone; sed se ne, vi elhakos ĝin. (Luk 13:6-9)



Jesuo estas la Mesio

3. Li naskiĝas en Bet-Leĥem

En tiu tempo regis en Romo la imperiestro Aŭgusto. Li proklamis ordonon: „Ĉiuj homoj kiuj loĝas en mia regno devas regi-strigi sin, ĉiu en la loko el kiu originas lia familio”. Tial Jozefo kun Maria iris de Nazareto al Bet-Leĥem, la urbo el kiu devenas la familio de Davido. Tiuloke Maria naskis sian unuenaskitan filon. Ŝi vindis Lin en tukoj kaj kuŝigis Lin en kripo, ĉar en la gastejo ili vane serĉis lokon.

En la ĉirkaŭaĵo de Bet-Leĥem estis ŝafistoj ĉe siaj gregoj. Sendito de Dio venis al ili. Lia brilo ĉirkaŭradiis ilin. Ili timegis. Sed la anĝelo diris: „Ne timu. Mi alportas al vi kaj al la tuta popolo ĝojplenan mesaĝon: hodiaŭ naskiĝis en la urbo de Davido via Savanto. Li estas Kristo, la Sinjoro. Vi Lin rekonos per ĉi tio: infano vindita en tukoj kaj kuŝanta en kripo. (Luko 2.1-12)

Bibliajn tekstojn tradukis

G. F. DE RUYVER F. C., Belgio

La novjaro estas la tempo de novjaraj promesoj. Nun estas tempo por ŝanĝiĝo en diversaj kampoj de la vivo. Ĉu vi sopiradis pri io nova? Ĉu vi sentas ke nun estas tempo agi? Eble vi jam donis vian novjaran promeson? La demando nu restas kiamaniere oni bezonas renovigon en la vivo? Jesuo en sia parabolo parolas pri figarbo, kiu ne donis frukton dum tri jaroj. Finfine la posedanto laciĝis kaj petis al la vinberisto elhaki la arbon. Eble la parabolo temas pri vi kaj pri via vivo? Eble vi dediĝis pri io, pri via edzo, aŭ edzino, pri viaj infanoj aŭ pri viaj gepatroj, pri viaj parencoj aŭ boparencoj, pri via laboro aŭ pri viaj amikoj, pri viaj libertempaj interesoj aŭ tute simple pri tio ke la vivo sentiĝas teda. Eble vi sentas ripetigantan maltrankvilon kaj volas ŝanĝi ion en la vivo, sed vi ne scias kion kaj kiel. Vi diras: „Elhaku ĝin, kial ĝi senutiligas ankaŭ la teron?”

La respondo de la vinberisto estas respondo rekte en vian vivon kaj pri viaj demandoj: „lasu ĝin resti antaŭ ĉi tiun jaron, ĝis mi fosos ĉirkaŭ ĝi kaj metos sterkon; kaj se ĝi poste donos frukton, bone”. Ofte oni bezonas renovigon en la vivo, sed renovigo ne ĉiam signifas ke oni energie ekskuu. Renovigo ne signifas ke oni elhaku ion centran el la vivo. Ofte ĝi signifas ke ni ĉirkaŭfosu kaj metu sterkon. Ĉirkaŭfosi signifas ke ni forfosas tion, kio ne estas same grava, tion kio ĝenas, tion kio estas centra. Eble oni dediĝis ĝuste pri tio, kio estas centra. Tamen oni devas forigi tion, kio ne estas centra, por ke oni povu akcepti la centran kun ĝojo. Ĉirkaŭfosu! Forfosu tion, kio ne estas centra. Metu sterkon! Uzu tempon kaj forton por tio, kio estas centra! Tiam la centra afero povas doni frukton kaj novan ĝojon en la vivo.

Renovigo povas signifi ke oni rigardas tion — kion oni jam havas — per no-

LA MOTIVO DE LA BONECO DE DIO

„Ĉar Vi [Eternulo] savis mian animon de la morto, miajn okulojn de la larmoj, miajn piedojn de falpuŝiĝo. [Tial] mi irados antaŭ la Eternulo en la lando de la vivo”. (Ps. 116:8-9)

La Eternulo estas bona. Li estas graca. Li estas kompatema. Li estas korfavora. Li estas fidela. Li protektas. Li konservas. Li savas. Li gvidas. Li gardas. Li kondukas. Li direktas. Li korektas. Ni povas pripensi multajn aliajn bonaĵojn kiujn Dio faras por ni, eĉ kiam ni ne meritas ilin. Tamen, ĉu ni pripensis la motivon de la boneco?

Dum mia legado de la Sankta Biblio unutage, mi legis la supre cititajn versojn en la angla traduko „New International Version” de la Biblio. Fascine, tiu traduko estas la nu-

vaj okuloj. Oni komencas danki al Dio, por tio, kion oni jam havas kaj akceptas ĝin kiel la bonajn donacojn de Dio, kiel al beno de Dio. Tio, kion mi jam havas estas beno de Dio, kvankam mi ne ĉiam pensas pri ĝi: sano, diversaj specoj da prospero, mia familio, miaj spertoj. La beno de Dio estas malsama por diversaj homoj, sed la fonto de beno tamen ĉiam estas Dio. La beno de Dio do venas al diversaj homoj en malsamaj manieroj. Tial iam estas malfacile klare montri kio estas beno.

Multaj homoj havas laboron, pri kiu ili estas hezitemaj. Iam oni opinias ĝin senchava. Iam oni opinias ĝin sensenca. Iam estas tro malmulte por fari. Iam estas tiel multe por fari, ke oni laciĝas kaj sentas sin sentaŭga, kiam oni ne povas plenumi ĉiujn

ra kiu havas la konjunkcio „tia” (en versiklo 9). Tamen, la konjunkcio estas malkovro al mi pri la boneco de Dio — Dio estas bona al mi POR KE MI VIVU POR LI. Li ne faras bonaĵojn senmotive.

Pripensu tion kion Dio faris por vi antaŭe. Pripensu tion kion Li faras por vi nuntempe. Pripensu eĉ tion kion Li faros por vi estonte. Kial Li faris, faras, kaj faros ilin?

„Aŭ ĉu vi malestimas la riĉecon de Lia boneco kaj toleremeco kaj pacieco, ne sciante, ke la boneco de Dio alkondukas vin al penso?” (Rom. 2:4).

Dio estas bona al ni por ke ni vivu por Li. Valortasku Lian bonecon per vivante juŝtan vivon por Li.

„Ĉar ĉe mi la vivado estas Kristo...” (Fil. 1:21).

Je la servo de Dio,

pastoro Bayo AFOLARANMI



postulojn. Ĉu tia laboro estas beno aŭ malbeno? La vinberisto konsilas al ni lasi ĝin resti ankoraŭ unu jaron, ĉirkaŭfosi ĝin kaj meti sterkon. Laboru plu, faru vian plej bonon, plibonigu viajn metodojn kaj rezignu la malpli gravajn aferojn. Tial vi eble havos renovigon en la ĉiutago.

Eble vi ne bezonas tiajn renovigojn? Tiaokaze ekzistas aliaj sferoj kie vi bezonas renovigon. Ĉu ekzistas lago, kie vi dum longa tempo ne banis somere? Ĉu vi skiis en tiu ĉi vintro. Ĉu vi legis la Biblion dum longa tempo. Tie ekzistas multaj eltroveblaĵoj. Ĉu vi havas malnovajn amikojn, kiujn vi povus reakiri. Renovigon vi povas fari tie ĉi kaj nun. Ĉirkaŭfosu kaj metu sterkon!

Leif NORDENSTORM

Direktante la rigardon al la aŭtoro kaj perfektiganto de la fido, Jesuo, kiu, pro la ĝojo antaŭ li metita, suferis la krucon, malestimante hon-ton, kaj sidiĝis dekstre de la trono de Dio. (He-beroj 12:2)

Estas ĉiam laboro de la Sankta Spirito turni niajn okulojn for de ni mem, kaj al Jesuo; sed la klopodo de la diablo estas ĝuste mala, ĉar li daŭre provas rigardigi nin al ni mem. Li kvazaŭdiras: „Viaj pekoj estas tro grandaj por pardono, vi havas nenian fidon, vi ne sufiĉe pentas, vi ne estas kapabla daŭri ĝis la fino; vi ne havas la ĝojon de Liaj filoj; via rilato kun Jesuo estas tiom nestabila... Ĉiuj ĉi tiuj estas pensoj pri ni mem, kaj ni neniam trovos nek sekurecon nek komforton en ni mem.

Sed la Sankta Spirito deturnas niajn okulojn for de ni mem. Li diras al ni ke Kristo estas en ĉio. Memoru, do, ke estas ne nia kompreno pri Jesuo kio savas nin: Estas Jesuo kiu savas nin! Estas Li. Eĉ ne la fido al Li savas nin. Estas Lia sango; pro tio, ni ne tiom rigardu al ni mem, nek al niaj manoj per kiuj ni prenis la manojn de Jesuo, sed ni rigardu al Jesuo; ni ne rigardu al nia espero, sed al Jesuo, la fonto de nia espero; ni ne rigardu al nia fido, sed al Jesuo, aŭtoro kaj perfektiganto de nia fido.

Ni neniam trovos feliĉon rigardante al niaj preĝoj, al niaj faroj, al niaj sentoj; kio ripozigas nin estas ne kiuj ni estas, sed kiu Li estas. Se ni volas ekvenki la malamikon kaj havi pacon kun Dio, ni devas rigardi al Jesuo.

Tenu vian rigardon simple al Li. Lasu Lian morton, Liajn suferojn, Liajn meritojn, Liajn glo-rojn, Lian propetadon, estu freŝaj en via mens-o; kiam vi vekigis matene, rigardu al Li; kiam vi kuŝiĝas nokte por ekdormi, rigardu al Li. Viaj esperoj kaj timoj ne metiĝu inter vi kaj Jesuo. Sekvu Lin tutkore, Li neniam trompos vin.

Dio benu vin ĉiujn!

Elmer ESCOTO

4. Jesuo: „Dio savas“

Subite estis multaj anĝeloj en la kam-po. Ili laŭdis Dion kaj jubilis: *En la ĉielo oni kantas glorkantojn antaŭ Dio kaj surtere la homoj estas en paco, ĉar Dio amas ilin.*

Post tio la ŝafistoj estis denove solaj. Ili diris inter si: *Ni tuj iru al Bet-Leĥem por vidi kio okazis.* Ili rapide kuris tien kaj trovis Jozefon, Marian kaj la infanon kiu kuŝis en kripo. Kiam ili ĝin vidis, ili rakontis kion Dio al ili sciigis pri ĉi tiu



infano. Ĉiuj, kiuj tion aŭdis, tre miris. Sed Maria gardis ĉion kion ŝi aŭdis en sia koro kaj pripensis ĉion.

La ŝafistoj reiris al siaj gregoj. Ili kantis laŭdkantojn kaj dankis al Dio por ĉio, kion ili vidis kaj aŭdis.

Kiam la infano estis oktaga oni donis al Li la nomon, kiun Gabrielo indikis: Jesuo, tio signifas: Dio savas. (Luko 2, 13-21)

Bibliajn tekstojn tradukis

G. F. DE RUYVER F. C., Belgio

LA REFORMITA LITURGIO KIEL PROKLAMO DE LA GRACO

Mi ne intencas fari al vi universitatan kurson pri liturgio. Mi nur volas doni al vi kelkajn irejojn por analizi iomete la reformitan liturgion kaj teologion.

Mi unue rigardos al la naturo de Diservo, de liturgio.

Poste mi rapide trapasos la historion de la kristanaj Diservo kaj liturgio ĝis la nuna reformita.

Mi tiam donos kelkajn karakterizojn de la reformita liturgio.

En sekvanta parto mi analizos la reformitan liturgion prezentitan en AD-ORU.

Kaj mi konkludos per la redindiko de la ĉefaj karakterizoj de la nuna reformita liturgio.

Kiam oni tralegas la diversajn litur-giojn prezentitajn en Adoru, oni unue rimarkas la grandan parton, kiu rilatas al la diversaj rom-katolikaj liturgioj, kvazaŭ tio al ili estas tre grava.

Apude troviĝas la ekumena Lima-liturgio, kelkaj de Taizé, unu de ortodoksia fonto, unu luterana, unu reformita, unu anglikana. Kompreneble ne estas menciitaj la Diservoj, kiuj ne havas verdire liturgiojn, kvankam ili havas nefiksitajn regulojn. Mankas ankaŭ la aliaj orientaj liturgioj.

Oni inter tiuj ordoj de Diservo retrovas elementojn, sinsekvojn, sed kun tiu aŭ alia malsameco. Neniu ŝanĝo estas komplete hazarda. Ĉiu havas signifon. Mia intenco estas klarigi al vi, se ne pravigi, la ordon de la reformita Diservo, ĉefe sed ne nur franca.

Unue, kio estas Diservo. Indikojn povas doni la diverslingvaj nomoj uzitaj. En la franca protestantismo, oni parolas pri *culte*, t.e. kulto. La germana donis sian esprimon al Esperanto, ĝi uzas *Gottesdienst*, t.e. Diservo. La angla uzas aŭ *service* (t.e. servo) aŭ *worship* (t.e. adoro).

Kultu, devenas de la latina, kaj la radiko signifas adori, kaj la praradiko signifas ĉirkaŭi, zorgi pri iu aŭ io. La angla *worship* rilatas digneco, kaj praradike al aliro. La servo, indikita per la alia esprimo signifas servo al Dio.

Tiu rapida filologia analizo kondukas al la konstato, ke la Diservo estas ĉefe direktita al Dio, ĉirkaŭ Dio. Dio estas la celo, la objekto, la subjekto de la Diservo.

La gloro de Dio, tio estas la celo de la Diservo, de la liturgio. la kristanoj kunvenas ĉefe por tio. Kiam oni iras al Diservo, oni iras al Dio. La Diservo celas Dion. La kredantoj venas por glori Lin, por laŭdi Lin. Li estas laŭdata pro la kreaĵo, pro la savo per Jesuo Kristo. Pro tio tio Li estas dankata.

Tiu, kiu iras al la Diservo por si mem, ĉefe, mistrafas la plej gravan rolon de la Diservo. Iri al la Diservo por la propra spirita sano, por ricevi energion por la semajno, tio ne estas la ĉefa kaŭzo, ne devas esti. La iro al la Diservo estas iro al rendevuo komunuma por adori, glori, laŭdi Dion.

Alia karakterizo de la Diservo estas ĝia dialogeco. Kaj ni laŭdas Dion, kaj Li

parolas al ni, redirante sian savmesaĝon. Tion ĉi oni retrovas jam en la Biblio, kaj en la maniero, kiel la kredantoj en la Malnova Testamento celebras la Eternulon. Oni povas trastudi kiel okazis la Diservo en la tabernaklo, en la Templo, aŭ en la sinagogoj. Oni retrovus kelkajn elementojn, kiel la gloro de Dio, la rememoro de la faroj de Dio, la aŭskulto de la Biblio, la komentoj, kaj ankaŭ la oferoj, la oferoj pro la pekoj kaj la oferoj pro dediĉo.

Troviĝas ankaŭ tiu teksto de Jesaja, kiu indikas ke la adorado fariĝis formala, kaj kiu insistas pri la vereco de la vivo, en Jesaja 58: (la) *fasto, kiu plaĉas al Mi, se vi disŝiros la ligilojn de malpieco, disbatos la katenojn de sklaveco*, ktp. Alia karakterizo de la Diservo estas la sendo. Per la Diservo, per la ricevita misio, la kredantoj estas sendataj al la mondo. Ili certe ne venis por si mem. Ili venis por glori Dion, ili venis por aŭskulti Lin, sed ili poste estas sendataj por atesti pri la gloro kaj savo de Dio, kaj por anonci kaj efektiviĝi tion.

Mi jam aludis al la juda Diservo. Fakte la kristana liturgio devenas de la juda liturgio. Unue kaj ĉefe ĉar la unuaj kristanoj estis judoj, kiuj sekvis la lokajn ceremoniojn. Ofte estas dirite en la Nova Testamento, ke ili iras por preĝi en la Templo. Krome ili ankaŭ havis aliajn kunvenojn, en la «alta ĉambro», kaj poste en domoj. Kiam Paŭlo vizitis la urbojn dum siaj vojaĝoj, li unue iris al la sinagogo, por partopreni en la celebrado de la Sabato, kie li prenas la parolon, kiel estis permesate al iu ajn kapabla, kiu bone konis la Skribojn. Oni ankaŭ volonte aŭskultis fremdulon. Poste, la kristanoj kunvenis pli kaj pli aparte de la judoj.

En la Nova Testamento aperas kelkaj indikoj pri la maniero Diservi de la unuaj kristanaj komunumoj. Elementojn oni povas trovi en la versiklo Agoj 2:42 — *la instruo de la Apostoloj, la kunuleco, la dispecigo de pano kaj la preĝoj*.

La instruo de la apostoloj: la kunveno okazis ĉirkaŭ la Skriboj. Kompreneble en la tiam ekzistantaj, tio estas la Malnova Testamento, la hebrea Biblio, sed ankaŭ rapide estis tekstoj de la apostoloj, kiuj iris de komunumo al alia. Paŭlo diras al ni, kion li predikis en 1 Kor 1:23 — *Kristo krucumita*, aŭ en Efesanoj 2:8 — *per graco vi saviĝis per fido, ĝi estas dono de Dio*. Tiu aŭskulto de la instruo, tekstoj kaj komentoj, estis akopanata de kredokonfeso, de komuna kredokonfeso. Kelkaj tiaj konfesaj tekstoj troviĝas en la Nova Testamento (Fil 2:6–11, aŭ 1 Tim 3:15–16). Tiu apostola instruo estas resumita kiel komuna al ĉiuj en 1 Kor 15:3–5.

La frata kunuleco estis io grava. Ili kunmetis siajn havaĵojn. Ili helpis unu la aliajn. Ili sufiĉe profunde interrilatis, de unu urbo al la alia, de unu gento al la alia, de unu socia klaso al la alia. La manifesto de tiaj kunulecaj rilatoj estis ankaŭ parto de la komunuma vivo, celebrado.

La divido de la pano estis grava al ili. Tio estis ordono de la Sinjoro, kaj rememorigas la unikan oferdonon de Kristo sur la kruco. Ili revivas por si mem, kion Kristo faris sur la kruco. Ili ankaŭ antaŭvivis la bankedon en la ĉielo.

Kelkajn tekstojn de preĝoj troviĝas en la Nova Testamento, sed certe ankaŭ grava estis la libera preĝo de la kredantoj. La juda tradicio preĝi la Psalmojn certe ankaŭ restis valida ĉe la kristanoj.

Krom la psalmoj, ili ankaŭ kantis himnojn. Kelkajn oni ankaŭ trovas en la Nova Testamento, sen muziko, bedaŭrinde. Tiuepoke, la kantado okazis ekzemple per responsaj kantoj, duono–duono, aŭ kantoro–sembleo.

La indikoj de la Nova Testamento lasas al ni impreson pri riĉeco kaj diverseco, sed ne sufiĉe da informoj, kiuj indikas jam fiksitaĵojn formojn aŭ ordojn aŭ relativan gravecon de la partoj.

La praekleziaj tekstoj, kiel ekzemple Didaho, donas diversajn indikojn pri la maniero celebri la Diservojn en la unuaj jarcentoj. Laŭ la jarcentoj, la ordo pli kaj pli preciziĝas. La unuan kompletan liturgion oni trovas en la Apostolaj Konstitucioj en Sirio en 375. Tiu epoko estis ankaŭ tiu, kiam kristanismo fariĝis oficiala, kaj kiam multaj venis al la eklezioj, post tre supraĵa katekizo. Estis ankaŭ periodo, kiam la diverseco de la unuaj jarcentoj, fariĝis pli kaj pli uniforma. Tio estas tamen komprenebla, se la plejparto de la ĉeestantaro ne estas profundaj kredantoj. Jam de antaŭa jarcento komenciĝis aperi, kaj plue disvolviĝis la pagana tendenco, iom magia, ke la celebrado ne plu estas simbola kaj rememoriga, sed ankaŭ efika per si mem. Kaj tiam, iom post iom, efika, uniforma, formala Diservo postulas specifan servanton, pastron. Ankaŭ, ĉar la religio kristana estis oficiala, la Diservoj devis okazi en la oficialaj lingvoj de la Imperio, nome la latina okcidente kaj la greka oriente.

Tiuj tendencoj ne malaperis en la Mezepoko, post la malapero de la Imperio. La liturgio pli kaj pli kompleksigis, la popolo ne plu komprenis, ĉar ĉe la Bibliajn tekstojn oni legis nur en la latina (1080). Eĉ la prediko, ankoraŭ tre grava

en la 4a kaj 5a jarcentoj preskaŭ komplete perdis sian valoron. La pastroj, ofte ne kapablaj kompreni eĉ la latinan, ricevis predikaron por legi laŭ la jaro.

La Reformacio estis periodo, kiam la Diservo multe evoluis, ankaŭ ĉe la romkatolikoj post la Tridentina Koncilio.

La reformatoroj kompreneble modifis la liturgion. La ĉefa ŝanĝo estis la lingvo. La Diservo okazas de tiam en la popola lingvo. Jam de pluraj jarcentoj, kelkaj homoj tradukis la Biblion en la popolaj lingvoj, kiel WYCLIFF en Anglio.

Luteranan Diservon vi trovos en *Adoru*. Komence, temis preskaŭ pri simpla traduko de la latina meso, sed tamen malpli da elementoj (17 anstataŭ 45). Nune, post 5 jarcentoj, la luterana liturgio «protestantiĝis».

Antaŭ ol paroli pri la Reformita liturgio, mi volas mencii, ke jam de la Reformacia periodo ekzistas alia branĉo de protestantoj, kiujn oni nomas foje la radikala Reformacio, apud la luterana kaj la klavinana (reformita). Eĉ antaŭe estis la valdanoj, aŭ la husanoj. Tiuj, ĉefe en la komenco la anabaptistoj, la menonitoj, la kvakeroj, al kiuj aldoniĝis en la postaj jarcentoj la baptistoj, la metodistoj, la liberaj eklezioj, kaj pli laste la pentekostanoj. Nuntempe, oni uzas por tiuj eklezioj la ĝeneralan terminon «evangelika».

Por ili, la Diservo okazas «sen liturgio». Dirante tion, ili simple diras, ke ne ekzistas fiksitaĵoj tekstoj direndaj, fiksita neŝanĝebla ordo. Sed tamen ekzistas reguloj kaj principoj. Oni retrovas ĝenerale la 4 elementojn de la praeklezia Diservo. La gvidadon de la Diservo ili lasas al la Sankta Spirito. Ofte estas liberaj preĝoj. La preĝoj dum la celebrado de la Sankta Manĝo ankaŭ oftege

estas liberaj.

La reformita liturgio devenas de la liturgio uzita en Strasburgo de Martin BUCER. Post vizito al Strasburgo, Jean CALVIN transprenis ĝin al Ĝenevo. En Francio, inter la diversaj protestantaj grupoj, la Diservoj estis antaŭe relative liberaj, ankoraŭ sen pastoroj (ili alvenos poste). En Svislando, ZWINGLI fariĝis pli malkatolika en sia maniero pritrakti la liturgion, kaj ankoraŭ nune en la alemanaj reformitaj eklezioj, la liturgio estas minimuma.

CALVIN ne plu celebris la liturgian jaron, kiu revenis en la reformitaj eklezioj en la 19a jarcento. La liturgiaj tekstoj, en la reformita tradicio ne estas devigaj. Same pri la ordo. Tamen, jen la modelo, kiu estis uzita en Svislando, en Francio, en Germanio, en Nederlando, en Skotlando:

Liturgio de la Parolo:

— biblia legaĵo

— pekokonfeso, kaj preĝo por peti pardonon

— versigita psalmo

— preĝo por iluminado

— prediko

Liturgio de la «alta ĉambro»

— preĝo

— propetoj

— Patro Nia

— apostola simbolo

— instituciaj vortoj

— kuraĝigo

— konsekra preĝo

— komunio (kun kanto de psalmoj aŭ bibliaj legaĵoj)

— postkomunia preĝo

— Aarona beno.

La kantado de la psalmoj estis subtenita. La rezulto estas la ĝeneva psalmaro, komuna al multaj reformitaj ekle-

zioj. Ŝajne ne multaj reformitoj troviĝis en la komisionoj por kaj *Adoru kanta* kaj *Adoru*, ĉar ne oftas en ili tiuj psalmoj.

Dum la 19a jarcento liturgio instaligis en Francio kiel referenco sub forta influo de BERSIER (1874). Post kunfandiĝo en Francio en 1938 de la du gravaj federacioj de reformitaj eklezioj kun kelkaj metodistaj kaj liberaj, la nova Reformita Eklezio de Francio lanĉis la verkadon de nova komuna kompleta liturgio. La rezulto estis la t.n. verda liturgio (1963). Ĝi estis uzata ĝis antaŭnelonge, ankaŭ strange en evangelikaj misiaj eklezioj en Afriko, kiel solvo por «specialaj kazoj», kiel ekzemple oficialaj ceremonioj. La Eklezio lanĉis reformon en 1989, kies rezulto estas nova liturgio en diversaj broŝuroj, laŭ diversaj ordoj.

La diverseco de la tekstoj uzitaj en la reformitaj eklezioj, jam de pluraj jardekoj, ne malaperis. Tiu nova liturgio iomete ŝanĝis la kadron, sed ne la spiriton.

Aliaj reformitaj eklezioj, kiel ekzemple la presbiterianaj eklezioj en Usono (PCUSA — Book of Common Worship — 1993) kaj en Skotlando (Common Order — 1994) same ŝanĝis siajn liturgiojn.

Dum tiu preparo de la nova liturgio en Francio okazis diversaj diskutoj.

Kiam sidi, kiam stari. La ĉefa diskuto estas dum la anonco de la graco. Se oni staras, tio signifas, ke oni atendas ion el la vortoj de la oficanto. Se oni staras nur post la diritaj vortoj, tio signifas, ke oni staras por danki Dion de la jam antaŭe donita savo.

Kiam meti la legado de la leĝo. La tradicia ordo, tiu en *Adoru*, indikas ke la

leĝo estas tio, kio montras la pekon. En la alia ordo proponita en unu el la novaj broŝuroj, la leĝo troviĝas post la anonco de la graco, kaj signifas, kion vi devas fari post kiam vi scias ke vi saviĝis.

Antaŭ ol trapasi kun vi la ordo de la liturgio citita en *Adoru*, mi volas doni kelkajn neajn punktojn.

En la reformita liturgio, ne troviĝas pastroj, nek iu speco de sacerdotoj. La pastoro ne estas pli ol alia kredanto en la liturgio. Li konas teologion, ne pli. La vortoj diritaj en la liturgio ne efikas en si mem. Ili diras la efikon de Dio. Ili faras nenion. Dio jam faris. La reformita liturgio ne estas loko de savo per si mem. Komprenoble, povas okazi feliĉe ke dum la reformita Diservo, troviĝas homo kiu venas al la fido, al la savo. Sed tio ne rilatas kun la formo de la Diservo, nur kun la efiko de la Sankta Spirito.

En la reformita liturgio, kiel en la reformita teologio, ne troviĝas negoco inter Dio kaj la homo. Nenio povas okazi ĉar iu ĉeestis Diservon aŭ ne per tiu simpla fakto. Veni al Diservo alportas nenion pli al la savo.

La reformita Diservo ne estas spektaklo. Kaj tio fariĝas problemo, kiam Diservo devas estis televidata. La teknikistoj ne scias kion montri. Ĉar fakte troviĝas preskaŭ nenio spektebla.

Jen nun, al *Adoru*, numero 87.

La unua tempo estas saluto nome de Dio. Ĉar, kile mi jam diris, Dio invitas. Ni venas al la Diservo por Dio, al Dio, pro Dio, kaj certe ne cele al ni.

Tuj sekvas preĝo al Dio, por ke ni fariĝu pretaj por tiu Diservo.

En la reformita liturgio, la kantado estas ĝenerala. Nur en specialaj okazoj estas horoj kiuj speciale kantas kelkajn himnojn, neniam ĉiujn. Estas du kate-

gorioj de kantado: la spontanea kaj la anoncita. La spontaneaj estas skribe indikitaj en la ordo, kaj la anoncigitaj estas anoncigitaj de la oficanto.

La dua preĝo estas laŭdo, ĝenerale pri la kreaĵo aŭ historio. Ofte temas pri legado de psalmo.

La sekvanta himno plej ofte estas psalmo (el la ĝeneva psalmaro).

Poste sekvas tiu parto kiu estas unu el la kernoj de la reformita liturgio, alternante legaĵojn kaj responsajn kantojn. Temas pri rememorigo de la savo, alvoko al pentito, al konvertiĝo, al redediĉo. La tradicia ordo estas jena: la leĝo de Dio, ĝenerale sed ne necese laŭ bibliaj citaĵoj, la pekconfeso, ĉar neniu plenumas la leĝon, kaj samtempe pardonpeto, ĉar Dio promesis pardonon, fine la anonco de la graco, ke Dio la amo de Dio superas nian pekon, ke la kredanto estas savita per graco, kaj tiam la homoj staras por danke kanti himnon. Bedaŭrinde, la indikoj pri sinteno ne troviĝas en *Adoru*. Mi jam diris ke en reformitaj eklezioj ne ekzistas pastroj. Tiu anonco de la graco estas simpla anonco de la savo operaciita de Dio mem. Do simpla laiko povas fari tiun anoncon. Tre ĝenis min la fakto, retrovita en la liturgio de Lima, ke la leganto de tiu anonco diras ke li estas ordinita. Mi eĉ ne komprenas ke la reformitaj teologoj lasis tiujn vortojn en la komuna liturgio de Lima.

La tempo de la kredokonfeso varias, sed plej ofte ĝi troviĝas en tiu momento.

Tradicie, kaj tio estas ankoraŭ valida en diversaj lokoj, antaŭ la kredokonfeso, la katekizatoj foriras, kun la infanoj, kaj restas nur la kredantoj, kiuj povas publike konfesi sian kredon, aŭskulti la pa-

rolon kaj la predikon, kaj partopreni la komunion.

La legata kredokonfeso povas tre vari laŭ tiu kiu havas la respondecon pri tiu legaĵo.

Poste venas la legaĵoj el la Biblio kaj la prediko, centra en iu ajn protestanta Diservo.

Nun kelkaj klarigoj pri la liturgio de la Sankta Manĝo.

La unua preĝo estas laŭda preĝo al Dio pro tiu signo, kiun Li donis al la kredantoj. La sekvanta kanto povas esti *Sanctus*, sed ne devige.

Post la kantado sekvas la legadon de la institucio, tio estas rememorigo de la teksto novtestamenta, kiu priskribas la Manĝon. Dum tiu legado, nenio estas farata.

Ĝin sekvas la epiklezo (nur unu!). Tiu epiklezo, kiel ĉiu epiklezo, estas peto pri la Spirito. Sed la reformitoj ne petas ke la Spirito iru al la elementoj, sed al la tuta komunumo. La pano restas, kaj restos pano, la vino restas kaj restos vino. Se ne dirita en alia momento, la preĝo Patro Nia estas komune dirita konklude al la epiklezo.

Post la invito, la partopenontoj venas, laŭ la plej kutima formo en Francio, por formi rondon ĉirkaŭ la tablo, aŭ la tuta ejo, por ricevi, aŭ transdoni al la najbaro, la elementojn. Kiam la rondo estas formita okazas levado de la elementoj, sen preĝo. La pladon kun la panopecoj kaj la kaliko iras de mano al mano, aŭ estas disdonita de la celebranto.

Tiu celebranto same ne bezonas esti ordinita. Simple la komunumo elektas tiun, kiu devas gvidi la Sanktan Manĝon. Ĉar la sanktaĵo troviĝas en la komunumo, ne en la elementoj.

Post la disdono, estas dankpreĝo kaj

resendo al la sidlokoj.

Foje, kiam la antaŭlasta parto troviĝas antaŭ la Sankta Manĝo, posvas esti ke la homoj restas en rondo por la finaj vortoj kaj preĝo.

La parto, kiu respondas al la kunuleca parto de la Diservo alvenas nun. temas pri la diversaj anoncoj kaj informoj, la propetaj preĝoj, kaj la monofero.

La Diservo finiĝas per sendovortoj, kiuj ĝenerale reprenas la moton de la prediko, kaj per beno.

Sed, post tiu prezento de la Reformita liturgio, mi ankoraŭ ne alvenis al mia titola temo, nome la anonco de la graco.

Jen do. Krom tio ke la Diservo estas kaj restas direktita al Dio, por Dio, ĝi estas ankaŭ publika. Iu ajn povas enveni kaj aŭskulti. Kaj kion tiu aŭdas?

Komence, la gloron de Dio, la laŭdon al Dio, kiun faras la kredantoj.

Poste, la resumon de la fido, la esencon de la fido, kiu multe similas al tio kion skribis Paŭlo, kaj ankaŭ Johano, nome ke Dio tiel amis la mondon, ke li donis sian filon, por ke ĉiu kiu kredas al li, ne pereu sed havu eternan vivon. Tiu versiklo (Joh 3:16) estas la centra moto de la Franca Reformita Eklezio. Ne surprize ke la mesaĝo estas ankaŭ centra en la Diservo. Do en parto, estas anonciataj la postuloj de Dio, la malforteco kaj peko de la homo, kaj la senpostula savo de Dio pro Jesuo Kristo.

Pli poste, la legadon de la Bibliaj pecoj kaj la predikon. Kompreneble, ili varias, sed fakte kion diri, se ne la mesaĝo pri la amo de Dio, pri lia savo per graco.

Kaj poste venas du tempoj, kiam la komunumo montras la vivantan gracon, per komuna memorigo de la ofero de Kristo sur la kruco, kaj per komunaj

DATDEVENO DE SPIRITO DE ASIZO

La 27an de oktobro 1986 surbaze de invito de la Papo en Asizo kolektiĝis religiaj reprezentantoj el la tuta mondo. Celo de ilia renkontiĝo estis nur unu: preĝi por la paco.

De tiam vivas la **spirito de Asizo**.

Konkludante la kunvenon en Asizo, la 27an de oktobro 1986 la Papo diris:

Tio kion ni hodiaŭ ĉi tie faris preĝante por la paco ni devas daŭrigi en nia vivo. Tio havas gravan signifon por la mondo. Se la mondo deziras travivi kaj se homoj devas travivi en ĝi, tiam la mondo ne povas esti sen preĝo.

dividoj en informo, preĝo kaj mono.

Kion konklude diri?

La ĉefa celo de Diservo, de liturgio estas kaj restas glori Dion.

Sed inter la temoj por glori Dion, troviĝas Lia graco, kaj nia savo per tiu graco.

Kaj estas ankaŭ tiu komisiio, kiun ricevis la Eklezio, anonci tiun savon, tiun gracon.

La Reformitoj ĉiam diris, ke la Diservo estas tempo por tiu anonco.

Celebri Dion estas proklami Lian gracon al la mondo. Tion celas la reformita liturgio.

Mi dankas.

Philippe COUSSON

To glorify God: Essays on modern reformed theology / Bryan SPINKS, Ed., Iain TORRANCE, Ed. — Grand Rapids, Mich.: Eerdmans, 1999. — 272 p.

Le culte dans la Bible et dans l'histoire / Alfred KUEN. — Saint-légier: Emmaüs, 1993. — 231 p.

Information—Évangélisation, 1995—2, 05/1995. Adoru: *ekumena Diserva libro*. — Freiburg: Ponto, 2001. — 1422 p.

Okaze de «Tago de preĝo de Asizo» la 24an de januaro 2002 reprezentantoj de diversaj religioj mesaĝis:

«Kolektitaj ĉi tie en Asizo ni kune meditis pri paco, la Dia donaco kaj komuna bono de la tuta homaro. Kvankam ni apartenas al diversaj religioj, tradicioj, ni konfirmas ke por la konstruo de paco nepras ami siajn proksimumojn estimante la oran regulon 'agu al aliaj kiel vi deziras ke oni agu al vi'».

Per tiu konvinko ni senlace laboras je la granda packontraŭo kaj tiel ni devantigas nin deklaradi nian firman konvinkon ke perforto kaj terorismo kontraŭas la originalan religian spiriton kaj kondamnante ĉion aliron al perforto kaj militoj, en la nomo de Dio kaj religio, ni entreprenas ĉion faelan por elradikiĝi la kaŭzojn de terorismo.

Dio benu niajn intencojn kaj donu justecon kaj pacon al la homaro.

Neniam plu perforto.

Neniam plu militoj.

Neniam plu terorismo.

Ĉiu religio kunportu sur la teron en la nomo de Dio justecon kaj pacon.

Pardonon kaj vivon. Amen.

Sekvante la ekzemplon de Sta Francisko kaj inspirante de «spirito de Asizo» ni devas konscii pri la graveco de interreligia dialogo cele al la paco en la tuta mondo. Espereble ankaŭ pluraj esperantistoj hodiaŭ aliĝos al lokaj porpacaj interreligiaj kunvenoj.

Okaze de ĉi datdeveno ni uzas la eblecon kaj informas, ke en la jaro 2006 IKUE planas okazigi interreligian esperantan kunvenon en Asizo. Tiu jaro estas i.a. signifa pro la 20jara datdeveno de **spirito de Asizo** kaj jaro en kiu oni memorigos 750 jaroj post la morto de Sta Francisko.

Marija BELOŠEVIĆ
Vicprezidantino de IKUE

Temo: Propono al la tutmonda samideanaro

Tre estimata samidean(in)o, ekde dek jaroj Papo Johano Paŭlo la Dua, je Pasko kaj Kristnasko, aldonas eĉ esperantlingve sian salutmesaĝon al la tuta mondo. Kiam mi estis prezidanto de IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) plurfoje mi petis ĝin al la Ŝtatssekretario de Vatikano kaj finfine oni konsentis la 3an de aprilo 1992.

Do, ĉi-jare okazas la 10a datreveno de la tiu evento tre utila al la E-movado. Ekde tri jaroj oni substrekas la paskan aŭ kristnaskan salut-mesaĝojn de la Papo en Placo Sankta Petro per la naŭliteraj paneloj E-S-P-E-R-A-N-T-O, iniciate de S-ro Giovanni CONTI el Milano, kiuj tre trafas la tutmondan televid-spektantaron (*Esperanto* nro 5/2002, koverto kaj p. 108; *Heraldo de Esperanto* nro 17/2002). Mi esperas ke ankaŭ en la venonta Kristnasko oni aranĝu tian spektaklon.

Tiokaze, mi proponas ke ni ĉiuj, ĉu je Kristanasko (por la ne-katolikoj kaj alireligianoj mi sciigas, ke Kristnasko okazos ĉiam la 25an de decembro) ĉu je Pasko (ĝia dato ŝanĝiĝas ĉiujare), aŭdigu sian dankon per letero, eĉ mallonga, adresita al Lia Eminenco SODANO kard. Angelo, Ŝtatssekretario, 00120 Città del Vaticano.

Mi opinias ke se miloj da gratul-leteroj atingos tiokaze Vatikano, la jam favora sinteno al Esperanto pliboniĝos. Tiu ĉi iniciato, se ĝi sukcesos, povus fariĝi deirpunkto por pripensi eksperimenton kaj eĉ la adopcion de la neŭtrala lingvo en la katolika Eklezio apoge de la kuraĝa propono, farita

dum la Eŭropaj Episkopaj Sinodoj 1991 kaj 1999, de la Ĉefepiskopo de Alba Iulia, Rumanio, D-ro Georgo JAKUBINI. Lia Ekscelenco, resume, asertis tute klare ke la katolika Eklezio, ne plu uzante la latinan lingvon, nepre bezonas neŭtralan lingvon Esperanto, ĉar ne eblas diskriminacie preferi en la Liturgio nur kelkajn naciajn lingvojn.

Mi invitas ĉiujn gesamideanojn, t. e. ĉu la laboristaro kaj intelektularo, ĉu la plenaĝuloj, la junularo kaj infanaro, verki tiun leteron por laŭdi la Ŝtatssekretariojn pro la iniciato de la E-salutmesaĝoj en la du gravaj festoj de la Katolikoj. Sed oni povas menci kaj gratuli ĝin pro la E-elsendoj de Vatikana Radio trifojesemajne, la aprobon de la Meslibro, la oficialan rekonon de IKUE fare de la Pontifika Konsilio por la Laikoj. Tre gravaj historiaj atingoj de IKUE, kiuj pruvas la malfermitecon de la roma eklezio al la planita lingvo kaj samtempe ili favoras la enkondukon de Esperanto en la katolika medio.

Tiu ĉi propono atingu eĉ la gesamideanojn de aliaj kristanaj kredkonfesioj (Esperanto kiel ekunena lingvo), tiujn de la aliaj religioj (Esperanto por la Interreligia dialogo), la ne-kredantojn kaj la ateistojn. Des pli bone se ili sin deklaras tiaj. Mi rimarkas denove ke se lavango da esperantlingvaj leteroj el ĉiuj kontinentoj antigos Vatikano, blovos nova lingva vento ĉe la centro de la katolikaro kun certa influo ankaŭ ĉe la civilaj institucioj.

Kompreneble, neniuj forgesu sian adreson. El ĝi la vaticanaj oficistoj divenas la Landon kaj por la respondo ili uzos ĝian nacian lingvon.

Se la kristnaska salut-mesaĝo ne okazos (unufoje dum la dek jaroj tio okazis pro malsaniĝo de la Papo), ni same skribu por substreki la bedaŭrandan mankon kaj ni petu insiste la daŭrigon de la ŝatataj salut-

40-procenta kresko de „Esperanto” ĉe Google

Se oni entajpas la serĉvorton „Esperanto” ĉe Google, oni ricevas indikon pri nuntempe inter 1,1 kaj 1,26 milionoj da paĝoj laŭ la diverslandaj paĝaroj de Google. En la pasintjara aprilo la sama nombro estis proksimume 750.000 paĝoj. Tiurilate Esperanto do kreskis per 40 ĝis 50 procentoj en unu jaro.


Paĝoj en kaj pri Esperanto

Al la kresko kontribuas pluraj faktoroj — unuflanke plimultiĝas la esperantlingvaj paĝoj kaj aliflanke la paĝoj, kiuj mencias Esperanton. Krome la kresko estas parto de ĝenerala progreso de la interreto kaj eble ankaŭ de la traserĉado de la reto pere de serĉmaŝinoj.

Esperantujo progresas

Sendepende de la fono estas evidente, ke la 40 procenta kresko de la paĝoj indikitaj de Google rilate al Esperanto signifas imponan progreson de Esperantujo.

Lu WUNSCH-ROLSHOVEN
EsperantoLand
fonto: ret-info



mesaĝoj okaze de venontaj Paskoj kaj Kristnaskoj kaj eĉ okaze, kiel ne, de eksterordinaraj tutmondaj okazintaĵoj.

Mi esperas ke tiu ĉi propono estu ŝatata de la tuta samideanaro kaj mi dankas ĉiujn pro la afabla atento. Samideane salutas kaj bondeziras ĉiujn

Pastro Duilio MAGNANI
(DM kaj D de UEA)

Viale Carlo Zavaglli 73,
47900 RIMINI-RN, Italio
Tel/fakso: +39(0)541.26447

Helpu nin helpi esperantistojn. Donacu por la kampanjo „Esperanto en la bibliotekoj!”

Lastatempe vi povis legi pri sendado de multaj libro-pakaĵoj al bibliotekoj publikaj kaj de Esperanto-grupoj tra la mondo. La librojn sendas ĉefe Aloisio Sartorato, ludoviko44@yahoo.com.br, de la Kultura Kooperativo de Esperantistoj en Brazilo, kaj komisiito de UEA por la kampanjo „Esperanto en la bibliotekoj!”. Sed ankaŭ la Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj en Japanujo regule sendas librojn al eksterlandaj bibliotekoj kaj UEA mem sendas kaj SAT-amikaro, ktp.

La sendado estas financata de esperantistoj. En UEA oni sendu sian kontribuon per la kutimaj pag-manieroj al la Fondaĵo Edukado kun la indiko „Bibliotekoj!”.

P.S. Se vi sendas monon al UEA por la Fondaĵo Edukado, bonvolu tion klare menci sur la pagilo. Pagmanieroj estas troveblaj en Jarlibro de UEA p. 33.

Unu el la pagmanieroj estas:

Poŝtbankkonto 37 89 64, Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam.

IBAN: NL24PSTB0000378964 (kvar nuloj, ne majusklaĵ literoj O) SWIFT: PSTB NL21

Mencio de IBAN kaj SWIFT kodoj permesas senpagan transkontigadon en Eŭropo.

Renato CORSETTI

La 26an de oktobro mi partoprenis en Aalen, la urbo de la germana E-biblioteko, la 9an FAME-premiadon (5000 EUR) favore al la nederlanda muzikgrupo Kajto. La solenaĵon ĉeestis 60 personoj, kiuj estis invititaj kaj gastigitaj de la urbo Aalen.

Ĉefurbestro Ulrich PFEIFLE malfermis la premiadon, d-ro Werner BORMANN salutis nome de la FAME-fondaĵo kaj la muzikisto Ralph GLOMP el Hamburgo omaĝis.

Kajto povas entuziasmigi per la muziko. Esperanto estas parto de ili, kaj ili estas parto de Esperanto!

Mi aĉetis la plej novan KD: Lokomotivo, rulu nun! (10 EUR).

La kantoj nomiĝas:

Fajfu, jen la Vivo!
 Ĉuk-Tsch tsch,
 Montaraj Reloj,
 Melankolia Trajnkonzono,
 La Alarmobremso,
 Stacidoma Muzikanto,
 Stacidoma Tumulto,
 Mia propra Trajno,
 La Malluma Vagono,
 Rulu nun!
 La Trajnobsedato,
 Atentu!

Speciale por fervojistoj la KD estu devo!

Salutas korege

Siegfried KRÜGER

LA SANKTA BIBLIO, MALNOVA KAJ NOVA TESTAMENTOJ KUN LA DUAKANONAJ LIBROJ, TRADUKITAJ EL LA ORIGINALAJ LINGVOJ (1250 paĝoj) 19,80 EUR, ĉe mendo de 3 ekzempleroj po 13,20 EUR plus sendokostoj.

Kiu ne povas pagi tiun prezon, kontaktu la kasiston.

ADORU, LA EKUMENA DISERVA LIBRO (pli ol 1450 paĝoj), 19,80 EUR, ĉe mendo de 3 ekzempleroj po 13,20 EUR plus sendokostoj.

Kiu ne povas pagi tiun prezon, kontaktu la kasiston.

ESPERANTE KAJ EKUMENE, festlibro por la 75a naskiĝtago de Adolf BURKHARDT (368 paĝoj), 30 EUR por KELI-anoj.



Estimata Philippe COUSSON! ✓ 103

Vi faris bonegan laboron redaktante *Dian Regnon* dum multaj jaroj. Mi devus esti dirinta tion antaŭe, sed mi tamen volas fari tion kvankam malfrue, ĉar mi legis ke vi forlasos la taskon al Bengt-Olof ÅRADSSON.

Mi samtempe volas sendi al vi artikolon, kiun vi povas uzi en via lasta numero, se vi tion deziras. Ĝi estas prediko por la novjara tago. Tamen ne hezitu ŝpari ĝin por Bengt-Olof, se vi havas sufiĉe da materialo.

Samideane

Leif NORDENSTORM,
 Paroĥestro en Boden, Svedio

Aktualajo

844. — p. 13-14. — *Kial ne alporti brikon por Domo de Paco en Kaŝmiro?* — TUINDER, Jacques

845. — p. 28. — *[Enhavtabelo de Esperante kaj ekumene]*

847. — p. 92. — *[Pacosemajno en Nederlando]*. — TUINDER, Jacques

848. — p. 117-119. — *18a internacia interreligia kunveno*. — BELOŠEVIĆ, Marija; SARANDREA, Carlo

849. — p. 135. — *Interesa novaĵo: 40-procenta kresko de „Esperanto” ĉe Google*. — WUNSCH-ROLSHOVEN, Lu

849. — p. 144. — *Oni apenaŭ povas kredi...* — TUINDER, Jacques

Biblio

844. — p. 12. — *Benoj por benialiajn*. — AFOLARANMI, Bayo

844. — p. 12-13. — *Alvenu kun kuraĝo*. — AFOLARANMI, Bayo

844. — p. 16. — *Filipianoj 2:5-8*. — KOOPMANS-SCHOTANUS, Jelly

844. — p. 17. — *Dio alparolas siajn infanojn. 5, Jesuo estas reĝo de la Judoj*. — DE RUYVER, G. F.

844. — p. 18. — *Psalmo 31:1-3*. — KOOPMANS-SCHOTANUS, Jelly

844. — p. 18. — *La preĝo de Manase*. — BERVELING, Gerrit

844. — p. 24. — *La centa psalmo*. — AFOLARANMI, Bayo

845. — p. 29-32. — *El la duakona libro 2(4) Ezra*. — BERVELING, Gerrit

845. — p. 32. — *Kion vi petus?* — AFOLARANMI, Bayo

845. — p. 36-37. — *Kiu pleje donacis? (Luko 21:1-4)*. — OSHO-DAVIES, Oluwabunmi Gabriel

845. — p. 37-38. — *Dieco kaj homeco de Jesuo (1, 2)*. — ESCOTO, Elmer

845. — p. 47. — *Dio alparolas siajn infanojn. 6, Li estas persekutata*. — DE RUYVER, G. F.

845. — p. 47. — *Psalmo 116:5-7*. — KOOPMANS-SCHOTANUS, Jelly

845. — p. 48. — *Kion vi tie havas en via mano?* — AFOLARANMI, Bayo

846. — p. 69-70. — *Se Jesuo Kristo ne releviĝis (1 Kor 15:12-20)*. — AFOLARANMI, Bayo

847. — p. 75. — *Voĉleterujo*. — AFOLARANMI, Bayo

847. – p. 76-77. – *Kanti Dian kanton sur fremda tero.* – OSHO-DAVIES, Oluwabunmi Gabriel
847. – p. 77. – *Kiu estas via «Dio»?* – AFOLARANMI, Bayo
847. – p. 78. – *Ĉielo kaj infero.* – KÜHNER, Axel; KRÜGER, Siegfried
847. – p. 78. – *La edziĝo en Kana.* – KOOPMANS-SCHOTANUS, Jelly
847. – p. 83. – *Ĉu vi scias, ke vi mem estas menciita en la Biblio?* *Jes vere!* – ESCOTO, Elmer
848. – p. 119. – *Morto, kie estas via venko?* – ESCOTO, Elmer
849. – p. 123. – *Kial Kristnaskofesto?* – AFOLARANMI, Bayo
849. – p. 123, 124, 126. – *Dio alparolas siajn infanojn.* – RUYVER, G. F.
849. – p. 124-125. – *Nova jaro: vidi per novaj okuloj.* – NORDENSTORM, Leif
849. – p. 125. – *La motivo de la boneco de Dio.* – AFOLARANMI, Bayo
849. – p. 126. – *Rigardante al Jesuo.* – ESCOTO, Elmer

Diversaĵo

845. – p. 34. – *Ora et labora.* – TUINDER, Jacques
845. – p. 39-40. – *Forkuro.* – KÜHNER, Axel; KRÜGER, Siegfried
845. – p. 40. – *Riski paŝoj de kredo.* – KÜHNER, Axel; KRÜGER, Siegfried
845. – p. 41-47. – *Mardo. 1.* – BER-

VELING, Gerrit

846. – p. 57-62. – *Mardo. 2.* – BERVELING, Gerrit
847. – p. 83-90. – *El la kvina libro. El la Analoj [Tacito].* – BERVELING, Gerrit
847. – p. 96. – *Lessing-jubileo.* – KRÜGER, Siegfried
848. – p. 109-110. – *Se plaĉus al la Dia graco.* – TUINDER, Jacques

Kongreso

844. – p. 20. – [Listo de aliĝintoj]
844. – p. 3-4. – *Personaj impresoj pri la 16a Ekumena Esperanto Kongreso.* – LUNDKVIST, Arne
844. – p. 4-7. – *Raportado pri la kongreso.* – TUINDER, Jacques; TUINDER, Vera
847. – p. 91. – *Tagordo de la jarkunveno KELI 2004.* – VAN DIJK, Els
848. – p. 101. – *Kongresaj impresoj.* – TICHY, Pavel
848. – p. 101-103. – *Raporto de la KELI-jarkunveno, la 5an de aŭgusto 2004.* – VAN DIJK, Els
848. – p. 99-100. – *Impresoj de la 54a Kongreso de KELI: Kongresatemo: Graco.* – VAN DIJK, Els

Kristanismo

844. – p. 14-15. – *Papo Johano Paŭlo II: beno „urbi et orbi kaj esperanto”*
844. – p. 14-16. – *Miraklo kun la*

pordo de ĉelo en malliberejo en Nagalando (Hindio). – LUNDKVIST, Arne

844. – p. 17. – *Jekaterinburgo: Caraj tagoj.* – KUZMENKO, Larisa
845. – p. 35. – *Ĉu la protestanta eklezio en Nederlando restu senepiskopa?* – TUINDER, Jacques
845. – p. 38-39. – *Drama atesto.* – LUNDKVIST, Arne
846. – p. 62-68. – *Sankta Birgitta.* – LUNDKVIST, Arne
846. – p. 72. – *Luther en la kastelo Coburg 1530.* – KRÜGER, Siegfried
848. – p. 111-113. – *Valdanoj.* – SOMHEGY, Zoltan
849. – p. 133. – *Datreveno de spirito de Asizo.* – BELOŠEVIČ, Marija

Letero

844. – p. 20-21. – *Estimata sinjoro Cousson.* – ROHLOFF, Wolfram
844. – p. 22. – *Kara redaktoro.* – WIKSTRÖM, Lilly
848. – p. 119. – [Gratulojn...]. – VEIT, Jerry
849. – p. 136. – *Estimata...* – NORDENSTORM, Leif
849. – p. 140. – *Karaj gefratoj en Kristo!* – LEJA, Kazimierz

Movado

844. – p. 21. – *Honore al Gerrit Berveling.* – VAN DIJK, Els
845. – p. 27. – [Solenaĵo por Adolf Burkhardt]. – KRÜGER, Siegfried

845. – p. 47. – *Nova aranĝo: la tuta Biblio en Esperanto.* – EICHKORN, Bernhardt

846. – p. 70-71. – «*Eŭropa bulteno*» reviviĝas
846. – p. 71. – *Jara raporto 2003 el Kongolando.* – MUNGULU, M., MATONDO, L.
847. – p. 91. – *81a Germana Esperanto-Kongreso.* – PFENNIG, Werner
847. – p. 92. – *Novgeedzoj Polnicky.* – CHRDLÉ, Petro
847. – p. 93-95. – *Kasista raporto.* – KRÜGER, Siegfried
848. – p. 113-. – *IKUE-KELI ĉe la Universala kongreso Pekino.* – EICHKORN, Bernhard
849. – p. 134-135. – *Propono al la tutmonda samideanaro.* – MAGNANI, Duilio
849. – p. 135. – «*Esperanto en la bibliotekojn!*». – CORSETTI, Renato
849. – p. 136. – *Kajto, FAME-premiita.* – KRÜGER, Siegfried

Nekrologo

844. – p. 22. – *Olle Olsson.* – REHM, Britta
844. – p. 23. – *Olle Olsson, 1909-2003.* – ANDREASSON, Bertil
844. – p. 23. – *Martin Howard.* – WALTER, Eric
844. – p. 23. – *Kerstin Sjöhlén.* – LANDFORS, Anna
846. – p. 51. – *Pri Adolf Burkhardt,*

grandulo de la kristana Esperanto-
movado

846. — p. 52. — *Forlasis nin Jaap
van Dijk*. — TUINDER, Jacques

846. — p. 53-55. — *La KELI-familio
perdis sian 'patron'*. — TUINDER,
Vera, TUINDER, Jacques

846. — p. 55. — [Adolf Burkhardt].
— AHLRÉN, Åke; GUNNARSON, Bir-
gitta

846. — p. 55-56. — *Raporto pri la
Diservo okaze de la adiaŭo de
Adolf Burkhardt*. — GÖLZ, Walter;
KRÜGER, Siegfried

Poezio

848. — p. 107. — *La graco de Dio*.
— LANDFORS, Anna

Recenzo

844. — p. 19. — *Kvar libroj el Rus-
lando*

845. — p. 27. — *Esperante kaj eku-
mene*. — TUINDER, Jacques

Teologio

844. — p. 10-12. — *Prediko [Ĝojo]*.

— TUINDER, Jacques

844. — p. 8-10. — «*Vi estos miaj
atestantoj*». — TUINDER, Jacques

845. — p. 33-34. — *La homecigo de
la homaro*. — CARDENALE, Ernesto;
KRÜGER, Siegfried

847. — p. 79-82. — «*En la komenco
Dio kreis la ĉielon kaj la teron*»
(*Ge 1:1*) *aŭ pensoj pri la kreado
kaj modernaj mondkonceptoj*.
— ROHLOFF, Wolfram

848. — p. 104-107. — *Mia graco
sufiĉas por vi (2 Kor 12:9)*. — TU-
INDER, Jacques

848. — p. 108-109. — *2 Korintanoj
12:1-10*. — COUSSON, Philippe

848. — p. 110-111. — *Karaj gefratoj
[Maria kaj graco en Bystrice]*.
— POSPIŠIL, Vaclav

848. — p. 114-117. — *Esperanto kaj
kristanismo*. — MA Yung Tae

848. — p. 120. — *La mezuro de
Dia kompatemo*. — TUINDER,
Jacques

849. — p. 127-133. — *La reformita
liturgio kiel proklamo de la gra-
co*. — COUSSON, Philippe.



Karaj gefratoj en Kristo!

Pasis relative longa tempo de mia kunlaboro kiel kuneldonisto de *Dia Regno*. De la nova jaro aliaj personoj transprenas taskojn de kompostado, presado kaj dissendo de la revuo. Dum la pasinta tempo mi zorgis, por ke nia revuo estu facila por legado kaj ĝustatempe sendita al vi. Ne ĉiam tio eblis, tamen ĉiam mi provis fari tion. Mi dankas al ĉiuj, kiuj faciligis mian laboron, kritikis ĝin aŭ laŭdis. Mi deziras al novaj redaktoro kaj enpaĝigistoj efikan kunlaboron por nia komuna utilo.

Kazimierz LEJA

Kotizoj de KELI 2005

Individua membro (kun Dia Regno)	20,00 EUR
Familia membro (sen DR)	2,00 EUR
Subtenanta membro (kun DR)	30,00 EUR
Dumviva membro (20-obla jarkotizo)	400,00 EUR
Abono DR (sen membreco) pagante rekte al KELI	16,00 EUR
per libroservo	18,00 EUR
KELI-anoj rajtas aboni <i>Espero Katolika</i>	
pere de la KELI-kasisto	12,50 EUR
IKUE-anoj rajtas aboni «Dia Regno» pere de	
C.O. de IKUE	10,00 EUR
Aerpoŝta sendado al ekstereŭropaj landoj	3,00 EUR

Adopta Kaso (por ebligi al finance malfortaj membroj la ricevon de DR; donacoj estas bonvenaj) Donaco

Pagmanieroj:

- Pere de landa kasisto/reprezentanto (vidu ĉi sube),
- Poŝtgire al Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, kaj menciu: por KELI-konto **kelk-p**
konto-numero en Belgio: 000-1631831-97
Germanio, Köln: 3182 91 509, BLZ 370 100 50
Nederlando: 378964
(el ekster NL aldonu pro bankkostoj 3,50 EUR)
IBAN: NL24PSTB0000378964; SWIFT:PSTBNL21
- Svedio: 74374-0
Svislando (Bulle): 12-2310-0
- Poŝtgire al la KELI-konto 5506132 de nederlanda Postbank N.V.
(INT CHR ESPERANT BOND — KELI — S KRÜGER HEILBRONN,
BIC: PSTBNL21; IBAN: NL38PSTB0005506132)
(el ekster NL aldonu pro bankkostoj 3,50 EUR)
- Per via konto ĉe UEA al la KELI-konto: **kelk-p**
- Per internacia poŝtmandato, adresita al la KELI-kasisto
Siegfried Krüger, Dinkelsbühler Str.12, DE-74074 Heilbronn,
tel./fakso +49 (0)7131 162688
- Per monbiletoj (internacia valuto), senditaj al la KELI-kasisto.

Landaj kotizoj

- Belarusio** (vidu ĉe Rusio) *)
- Britio** 15 GBP
Nacia ĝirokonto n-ro 65 274 0006 nome de Fellowship of British Christian Esperantists (FBCE). Kasistino: Diana Richardson, 59 Croft Wynd, Uddington, Glasgow, Skotlando G71 7BJ
Tel.: 01 698 816 341
- Bulgario** *)
Peranto: Christo Dimitrov, str. Stracin 16
7300 Kubrat
- Ĉeĥa Respubliko** (inkl. Slovaka Respubliko) 250 CZK
Peranto: Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III.
29001 Poděbrady, Tel.: 324 615 651
- Estonio** *)
Peranto: Endel Ojasild, PK. 24, EE-10502 Tallin
- Finnlando** 30 EUR
Banka konto Sampo n-ro 800027-4306 454 nome de Suomen Kristallinen Esperantoliitto. Kasistino: Soili Salminen
Kivikatu 8 C 51, 15700 Lahti, Tel.: 03-781 7637
- Francio** 25 EUR
CCP n-ro 10456 15 U Paris, nome de Franca Evangelia Esperanto-Ligo (FEEL). Kasisto: Philippe Cousson
26 Rue de Pré Ventenet, FR-86340 Nouaillé-Maupertuis
Tel.: 05 49 468021
- Germanio** 24 EUR
Evang. Darlehnsgenossenschaft Kiel n-ro 47 00 40, BLZ 210 602 37
nome de Ökumenische Esperanto-Liga e.V.
Kasistino: Astrid Hanke, Am Friedrichshain 37, 25980 Westerland/Sylt
Tel.: 04651 5510, Fakso: 04651 21963
- Hungario** *)
Peranto: Irén Bagi, Baross u. 54/B.II.8, 1201 Budapest
Tel.: 01 283 6566
- Japanio** 20 EUR
(aerpoŝte + 3 EUR)
- Kazaĥstano** (vidu ĉe Rusio) *)

- Korea Respubliko** 20 EUR
(aerpoŝte + 3 EUR)
Peranto: D-ro Puramo Chong, Kwangmyong-Shi
Kwangmyong 2 dong 50-5, Kyongki-Do, Sud-Koreio 423-012
- Latvio** *)
Peranto: Valdis Gulbis, Lielá iela 1 dz. 2,
Valdemārpils Talsu raj, LV-3260
- Litovio** *)
Peranto: Erikas Laiconas, p/k 165, 3000 Kaunas, Tel.: 370 7 222131
- Nederlando** 25 EUR
Poŝtbankkonto n-ro 108 75 75 nome de Chr. Esperanto Verg. KUNE
Kasistino: Gerda Dercks, Molenstraat 20, 7607 AL Almelo
Tel. kaj fakso: +31(0)546 819 403
- Pollando** 30 PLN
Peranto: Kazimierz Leja, poŝfako 59, 41-250 Czeladź
Tel.: +48(32) 265 00 38 (vespere)
- Rumanio** *)
Peranto: Maria László, OF1.C.P. 38 Exterior, 4800 Baia-Mare
Tel.: 062 426182
- Rusio** (inkl. Belarusio, Kazaĥstano kaj Ukrainio) *)
Peranto: Larisa Kuzmenko, Kuŝvinskaja 25 A, 622013 N. Tagil,
Sverdlovskaja Obl. Rusio
- Slovaka Respubliko** (vidu ĉe Ĉeĥa Respubliko) *)
- Svedio** 220 SEK
Poŝtĝirkonto n-ro 9 14 39-0 nome de Kristliga Esperantoförbundet.
Kasisto: Bengt-Olof Åradson, Heimdalsvägen 24, SE-149 32 Nynäshamn
Tel.: +46 8 – 520 16 816
- Svislando** 20 EUR
Pagu al la svislanda UEA-konto (vidu supre)
- Ukrainio** (vidu ĉe Rusio) *)
- Usono** 23 USD
(aerpoŝte + 3,50 USD)
Peranto: Jerald T. Veit, 3578 S. Taylor, Milwaukee, WI 53207
Oni sendu ĉekon au poŝtmandaton al la peranto.

*) kotizo laŭ interkonsento kun la peranto

Kara Filipino,

Mi esperas ke vi bone fartas kaj ke la KELI-prezidanteco plenigas vin per ĝojo kaj kontentigo. Salutas vin kaj vian karan familion, ankaŭ en la nomo de Vera,

Jacques

ONI APENAŬ POVAS KREDI...

Dum la lasta tempo, ĉar Fondaĵo Evidente havas gravan porblindulan projekton en tiu lando, mi denove tre okupiĝas pri Kosovo, jam preskaŭ malaperinta el la novaĵrubrikoj de televido kaj gazetaro.

Oni apenaŭ povas iom kompreni: la militistoj, kies precipa tasko estas protekti la Kosovan loĝantaron, kaŭzas — kontraŭe — abundon da mizero kaj sufero. Kosovo, nome, fariĝis centro de eŭropa negocado pri virinoj. Kaj kelke da eksterlandaj soldatoj en tio ludas ekstreme duban rolon!

Pensante pri Kosovo ni plejofte havas antaŭ la mensaj okuloj la dramajn okazintaĵojn fine de la naŭdekaj jaroj, kiam perforte atakintervenis NATO-anoj. Sed multaj homoj ne scias, ke ankaŭ hodiaŭ okazas nepriskribeblaj teruraĵoj. Kaj nemalmultaj tie ankoraŭ 'servantaj' militistoj plene kunresponsas.

Pli ol naŭ el dek negocitaj virinoj en Kosovo deĵoras en la tiel noma-

ta seksindustrio. Ankaŭ internaci-armeaj soldatoj uzadas iliajn servojn, dum ilia unua devo estas chiel protekti tiujn virinojn. Sekve de sia speciala pozicio oni nur malofte punas ilin pro ilia helpado al tiuterenaj fiuloj.

Ke miloj da virinoj viktimiĝis kaŭze de ĉi tiu terura misuzado de potenco estas vera dramo. Kaj ke ĝhuste pacarmeaj militistoj ĉe tio koncerniĝas, estas superlativa skandalo! Tial AMNESTIO INTERNACIA alvokas la aŭtoritatulojn en Kosovo fari antaŭzorgajn aranĝojn por preventi negocadon pri virinoj kaj devigan prostituadon de junaj knabinoj kaj plenkreskaj virinoj.

La agado de Amnestio jam kondukis al ekrezultoj, sed pli da iniciatoj kaj protestoj necesas. Se ni havas la eblecon ĉi-kampe plifortigi la laboron de Amnestio, hezitu eĉ ne unu minuton!

Jacques TUINDER